

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

4 JUNIO 1978
66-A JARKOLEKTO

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Nova prezidanto

Rapide, rapide, ĉio rapide. Tio estas mia impresio pri la jarkongreso de SEF en Uppsala. Kaj tiu rapidado ne estas stranga: en du tagoj oni volis, kaj sukcesis, fari same multe kiel kutime en tri.

La jarkunveno, ekzemple: ĉu iam ni pritraktis ĉiujn tagordajn punktojn pli rapide? Tiel rapide, fakte, ke subite, tute ne atendite por la plejparto, SEF post preskaŭ tridek jaroj dum kiuj ĝia prezidanto havis la nomon Jan Strönne, subite troviĝis kun nova prezidanto kies nomo estas Roland Lindblom. Li ne estas tre nova inter la svedaj esperantistoj, sed li tamen estis nekonata vizaĝo por pluraj.

Roland estas 46-jara inĝeniero, kiu estas ankaŭ prezidanto de la klubo de Nynäshamn, kiun li kunfondis. Pli frue li gvidis la societojn de Alingsås kaj Trollhättan, kies iniciatinto li ankaŭ estis.

Inter la hobiaj de Roland estas parkerado de PIV (tio estas almenaŭ mia persona impresio pri lia kono de la esperanta vortrezoro).

Ĉar Jan Strönne forlasis la prezidantan postenon, sed ne la estraran laboron (oni tuj elektis lin en la estraron), li ne volis ricevi iajn honorigojn. Sed post tridek jaroj da gvidado de SEF li ne sukcesis eviti tion. Karl Söderberg, transdonante florbukedon, akcentis, ke la fortoj de Jan sufiĉis dum tiuj tridek jaroj ne nur por SEF, sed ankaŭ por la internacia movado, por prelegoj kaj kursoj, aranĝo de prelegvojaĝoj kaj konferencoj, ekzemple tiuj en Frostavallen.

Post tridek jaroj subite la prezidanto de SEF ne plu havas la nomon Jan Strönne, sed Roland Lindblom

Ankaŭ Sven Alexandersson aliĝis al la honorigo, transdonante nome de SEF la numeron 1 de la libro «50 jarojn kun Paul Nylén», kiun Strönne mem iniciatis kaj siatempe transdonis al Paul Nylén. Tiu libro ekzistas en unika bibliofila bindo.

Okazis kompreneble simbola transdono de la prezidanta martelo kaj per tio SEF eniris novan epokon, daŭre kun Strönne en la estraro, sed kun nova marteltenanto.

Ankaŭ pri la aliaj demandoj de la jarkunveno ne okazis diskuto. Oni akceptis ĉiujn proponojn de la estraro.

Dum ioma lukseto kutimas karakterizi la SEF-kongresojn

dum la aliaj jaroj, oni multon aranĝis mem en Uppsala, ekzemple la manĝojn, kiuj okazis en la lernejo mem, en Katedral-skolan. Tio tute glate kaj rapide funkciis. En la sama manĝejo okazis ankaŭ la varia vespera programo en la sabata vespero. Ludis amatora orkestro de NBV kaj kantis improvizita kantgrupo de junaj upsalaj esperantistoj, tute plaĉe. Dum la vespero estis ankaŭ diskonigita la rezulto de la traduka konkurso, kun legado de la premiitaj eroj. Improvizita vespero, parte, sed tute ĝuebla.

Intence mi preterlasis mencii la grandan okazaĵon de la kongreso, nome la podian diskuton,

ĉar vi trovos alian artikolon pri ĝi. Mi menciu anstataŭe neplatan diskuton pri longdaŭra plano, kiun SEF nun preparas. Gvidis ĝin Roland Lindblom.

Denove montriĝis la bezono povi diskuti dum niaj kongresoj nian laboron kaj niajn prioritatojn. Tiu diskuto fariĝis vere utila, ankaŭ se ĝi parte temis pri ventumado de la ĉiamaj demandoj.

Mi bedaŭrinde ne faris notojn dum tiu diskuto, pro tio mi eble forgesos mencii ion gravan. Sed mi memoras, ke partoprenis en la diskuto Malte Markheden, kiu relevis la demandojn pri esperantaj programoj en la sveda radio, almenaŭ unufoje semajne. Pli facile estas, laŭ pluraj, eniri la lokan radion kun programo pri esperanto; sed tio estas alia demando.

Roland Lindblom parolis iom pri longdaŭra plano kaj pri la bezono starigi dokumentan centron, kion la estraro baldaŭ intencas proponi. Alia grava demando estas manko de instruistoj, kiu en Svedio jam estas kronika.

Okazis ankaŭ diskuto pri politika agado. Ekzistis plena konsento pri la graveco de tiu laboro kaj pri la graveco ne limigi sin al nur unu partio. El vidpunkto de neŭtraleco estas tute en ordo labori al politikistoj, kondiĉe ke oni ne preterentent kelkajn politikajn partiojn. Pluraj ekzemploj estis donitaj, sed oni ĉiam revenis al la esenca demando: laboru tie, kie vi povas havi sukceson; vi sciu, kion vi celas; kunordigu vian agadon kun aliaj.



En la vespero amuzigis nin la orkestro de NBV, sur la bildo.

Franko Luin

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 00 Tyresö

Telefon: 08 - 712 82 91

I redaktionen: Sven Alexandersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom, Geoffrey Sutton

Prenumeration 1978: 40 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Sv. Esperantoförbundet

Tidningen utkommer med 8 nummer per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden

Sats: Esperantoförbundet

Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1978

La Espero gör uppehåll

Här kommer vårens sista nummer av *La Espero*. Som du vet gör vi uppehåll under sommaren och kommer igen i september med ett nummer full med information om världskongressen i Varna mm.

Du letar förgäves i detta nummer efter vår serie *Ĉiutaga esperanto*. Den har fått utgå i detta nummer på grund av utrymmebrist. Men den kommer igen.

tioner på er ort och berätta om för dem om esperanto. Ni har ju ett intressant häfte att visa eller ge dem. Häftet handlar om internationella kontakter och scouter har behov av det.

Några klubbar har redan beställt de exemplar som de behöver. Har din klubb gjort det? Om inte, gör det snarast, enklast genom att betala en viss summa till Västerås Esperantoklubb, postgiro 88 43 12 - 0. 100 exemplar går åt hur snabbt som helst.



En vidare horisont

På varje årsmöte sägs det att vi bör göra något åt scouterna. Nu finns det en konkret möjlighet att göra något åt det!

Västerås Esperantoklubb har tagit initiativ till en svensk utgåva av ett 32-sidigt häfte för scouter. Detta häfte finns redan på 8 språk och är skrivet av sekreteraren i *Skolta Esperanto-Ligo*. Häftet är redan översatt (av Lennart Sundman); Victor Janheim har lovat att gå igenom det en gång till för säkerhets skull. Snart är det alltså dags att ge ut det. Utgivaren är SEL, scoutorganisationen alltså, men den behöver ekonomiskt stöd. Inga gåvor: det räcker att förhandsbeställa ett antal exemplar. Det räcker med en garanterad upplaga på 800 exemplar. Det har vi i Sverige användning för!

Varje exemplar kostar, vid förhandsbeställning, 1,50. Har ni användning för 100 exemplar kommer det att kosta klubben 150 kronor. Ni kan sälja vidare häftet eller ge bort det. Ni kan ta kontakt med scoutorganisa-

Här får du hela styrelsen

Man hittar inga nya namn i styrelsen för Esperantoförbundet, men det finns en del förändringar. Här kommer hela listan:

Roland Lindblom, ordförande
PI 3086, 140 40 Ösmo
tel 0752-421 43

Märtha Andréasson, viceordf.
2265 Tolsered, 425 90 Hisings
Kärra, tel 031-57 11 33

Ulla Luin, sekreterare
Myggdalsvägen 123
135 00 Tyresö, tel 08-712 82 91

Sven Alexandersson, kassör
Krokvägen 85, 122 32 Enskede
tel 08-49 80 24

Franko Luin
Myggdalsvägen 123
135 00 Tyresö, tel 08-712 82 91

Jan Ströme
Amiralsgatan 36
211 55 Malmö, tel 040-12 92 11

Bertil Åkerberg
Lillsvängen 39, 126 57 Häger-
sten, tel 08-46 29 95

Linnea Edsenius, suppleant
Wilhelmsgatan 2
382 00 Nybro, tel 0481-107 44

Kerstin Rohdin, suppleant
Rosenborg, Box 5358
702 21 Örebro, tel 019-16 08 46

Tio nya välkomnas

Klubo Cent, Esperantoförbundets nya 'klubb' av understödjande medlemmar fortsätter att öka. Fram till mitten av maj har SEF kunnat registrera tio medlemmar till: Carl Arenheim, Arlov, Hildur Södergren, Borlänge, Gunnar Mattsson, Skövde, Hjalmar Örtenblad, Ljungaverk, Tore Gustavsson, Skövde, Henry Almar, Uddevalla, Anna Ericson, Sundsvall, Britta Lindeberg, Malmö, Thorsten Farm i Sundsvall och Stig Åsjö i Spånga.

Klubben är öppen för fler medlemmar.

Man blir medlem i **Klubo Cent** genom att betala 100 kronor till postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet, och ange vad det gäller på talongen.

SEF hälsar de ovannämnda välkomna och tackar för deras bidrag.

Ne plu estas inter ni

Ni devas denove kun bedaŭro informi, ke forpasis kelkaj el niaj plej fidelaj membroj.

En Malmö mortis **Otto A. Nilsson** (jam la 20an de januaro), preskaŭ 84-jara. Li estis fakte unu el niaj pioniroj kaj kun grandega intereso sekvis ĉion en la esperanto-mondo.

La 29an de marto mortis en Karlskrona **Gunnar Malmsten**, nur 53-jara. Li estis kasisto de la esperantoklubo de Karlskrona. La klubo dankas lin pro la bona laboro kaj memoras lin kiel bonan amikon.

En la malsanulejo de Danderyd mortis la lan de aprilo nia longjara kunlaboranto kaj amiko **Hugo Andersson**, 85-jara. Dum la lasta tempo li laboris por esperanto en Hofors, kune kun sia edzino.

Gotenburgo ekfunebri la 7an de majo, kiam **Erik Eksström** forpasis. Li estis unu el la fondintoj de la esperantoklubo de Gotenburgo (kiam ĝi havis la nomon Esperantoklubo de ABF), ĝia longjara prezidanto kaj idedonanto.

Dum siaj multnombraj vojaĝoj eksterlanden li amikiĝis kun multaj esperantistoj, pri kio rakontas lia ampleksa korespondado. La esperantomovado en Gotenburgo sentas la perdon de Erik.

Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Hägerav. 31

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 - 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift 1978: direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem utan tidning 15 kronor

Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllenvångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept - 15 maj: onsdagar kl. 10 - 11, torsdagar kl. 17 - 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Ströme

Medhjälpare: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

Ni startas 'sonotekon'

Alvar Clevfors el Lysekil ŝparis dum multaj jaroj esperantodiskojn kaj daŭre havas kelkajn, kies kvalito ebligas aŭskultadon. Li surbendigis ilin sur kaseton kaj sendis al SEF. Sur ĝi troviĝas registritaj *La Espero* kaj *La Tagiĝo*, kelkaj kantoj sub la nomo *El Trinkejo* kaj peco de esperantokurso.

Interese estas, ke antaŭ ne tre longe Sven Alexandersson ankaŭ havis la ideon, ke SEF devus kolekti diskojn kaj sonbendojn kun kantoj, simile kiel ni faras kun libroj.

Kiel vi eble scias, SEF havas en sia oficejo sufiĉe grandan bibliotekon. Sven Alexandersson pretas zorgi pri la kolektado de diskoj kaj sonbendoj. Ĉu ni nomu tion 'sonoteko'?

Se vi havas diskojn aŭ surbendigojn hejme, kiuj povus esti interesaj por tiu kolekto, kontaktiĝu kun Sven. Lia adreso estas Krokvägen 85, 122 32 Enskede. Interkonsentu kun li kion fari kun viaj 'sonmemoroj'.

La sonbenda kaseto de Alvar Clevfors do jam eniris la novan sonarkivon.

Radio Zagreb nun en mardoj

Kiam la listo pri radiostacioj, kiuj estas kapteblaj en Svedio aperis en la antaŭa *La Espero*, ĝi jam ne plu estis akurata. Dum la presado Radio Zagreb ŝanĝis sian dissendotempon al **mardo** je la 23.45. Bonvolu do korekti la koncernan informon sur paĝo 23 de *La Espero*.

Nova estraro ankaŭ por SEJU

Ankaŭ SEJU havis sian jarkunvenon en Uppsala kaj elektis novan estraron. Nova prezidanto fariĝis Guy Coste, kiu studas en Uppsala. La cetera estraro estas disigita tra la tuta lando: la vicprezidanto Åke Engström loĝas en Visby, la sekretario Jan Setréus en Johanneshov, la kassistino Inga Johansson en Gotenburgo, la vicsekretario Milorad Ljubisavljević en Älta, la redaktoro de *ktp* Leif Karlsson en Kiruna kaj la respondeculo pri renkontiĝoj, Jan-Olof Svensson en Tidaholm. Ni deziras al la nova estraro bonan sukceson.

Serĉataj grandaj bibliotekoj

Kiom da grandaj kolektoj de esperantolibroj ekzistas en Svedio? Tion ŝatus scii Marinko Ĝivoje, P.p. 5025, YU-41040 Zagreb-Dubrava, Jugoslavio.


Li bezonas tiun informon por kompletigi sian studon pri esperanto-literaturo kaj planlingvaj kolektoj en publikaj kaj privataj bibliotekoj. En konsidero venas nur bibliotekoj kun minimume 1000 volumoj aŭ 10m de bretlongo.

Ĉu via klubo aŭ iu membro de via klubo havas tiom da libroj? Aŭ ĉu eble via urba biblioteko? Sendu informon pri tio al la supra adreso kaj indiku la adreson, nombron da libroj (aŭ bretlongon), ĉu klasifikita katalogo ekzistas *ktp*.

Vi certe komprenas, ke li faras tre utilan laboron, do helpu lin kiel eble.


HODIAŬ

Nur kelkaj pensoj post la kongreso de Uppsala



Ĉu du tagoj sufiĉas por SEF-kongreso? Nun, post la kongreso de Uppsala mi kredas, ke ni bezonas tri tagojn. Mi esperas, ke ni en la venonta kongreso povos aranĝi diskutadon inter la klubaj reprezentantoj kaj la estraroj de SEF kaj SEJU. Ni havas multajn komunajn problemojn kaj certe estus fruktodone profunde kaj detale priparoli ilin.

Post preskaŭ 30 jaroj kiel prezidanto nia Jan Strönne petis eksigon. La estraranoj tamen persvadis lin resti en la estraro kaj li tion akceptis. Ankaŭ la kongreso havis la saman volon kaj tial li ankoraŭ estas estrarano. Pro aliaj reelektoj la estraro havas samajn membrojn ankaŭ en tiu ĉi jaro.



Ankaŭ SEJU havas nun novan prezidanton, post eksigpeto de Marianne Westman. Neniu anoncis sin preta transpreni la postenon, kaj tial okazis, ke la amikoj de Guy Coste dimanĉe matene trenis lin el la lito kaj petis lin fariĝi la nova prezidanto. Guy Coste estas franco, kiu venis al Svedio antaŭ kelkaj jaroj. Li havis diversajn okupojn en diversaj lokoj kaj nun li studas en Uppsala.

La kongreskomitato en Uppsala faris multan laboron por diversmaniere kontentigi la vizitantojn kaj bone plenumis tiun taskon. Nia vigla samideano Karl Söderberg sukcesis aranĝi podian diskuton kun eminentaj partoprenantoj. La valoro de tio estas, ke ni devis aŭskulti por ni ĝenajn, sed utilajn demandojn.

Nun ni devas analizi la demandojn kaj poste klopodi agi pli saĝe ol ĝis nun. Ĉu eblas? Mi ne scias, sed tamen estas necese por konvinki skeptikulojn.

Roland Lindblom

Ekspozicio en Nynäshamn



La bildo montras ekspozicion, kiun la Esperanto-Societo de Nynäshamn ellaboris. Oni montris ĝin en la urba biblioteko kaj en pluraj lernejoj. La tutan laboron, ankaŭ la stativojn k a, faris la klubanoj mem.

Amikaj al esperanto la malsimilaj opinioj

La bela, sed absolute tro granda aŭlo de Katedralskolan estis la diskutejo en kiu kolektiĝis la universitata rektoro Torgny Segerstedt, profesoro Harald Riesenfeld, ĉefbibliotekisto Gert Hornvall, parlamentano Arne Gadd kaj docento Ebbe Vilborg.

Gvidis la podian diskuton Karl Söderberg, kiu post kelkaj enkondukaj vortoj transdonis la parolon al Ebbe Vilborg.

Vilborg klarigis, ke estas preskaŭ nature, ke la esperantistoj interesiĝas pri la demando de «Lingvoproblemoj en internacia komunikado» (tio estis la temo de la podia diskuto), ĉar "la esperantistoj estas programi-

taj" por tiuj demandoj, kiel li esprimis sin.

En sia parolado li donis historian priskribon pri la traktado de la demando: en Societo de Nacioj, en Unesko, en la sveda parlamento. Li konsentis, ke tiu traktado je alta nivelo ne povas esti opiniata kiel kontentiga.

Samtempe la internaciaj kontaktoj kreskas. Dum ili antaŭe estis ligitaj al malgrandaj elitoj, ili pli kaj pli amasiĝas. Tio devos necesigi alian ol elitajn solvon.

Vilborg demandis sin, ĉu la internaciaj kontaktoj funkcias kontentige kaj devis respondi nee. Li ankaŭ rimarkigis, ke

mankas internacia konsento pri lingvouzado. Laŭ li eĉ ne unu internacia organizaĵo uzas nur la anglan — la evoluo iras en la alian direkton, al pli da lingvoj.

Torgny Segerstedt tenis sin al la rolo de lingvo en la scienca mondo. Li komencis per Linné kaj lia kono de la latina lingvo, kiu ebligis al li komunikadon kun aliaj tiutempaj sciencistoj. Per la forlaso de la latina ni en Eŭropo devis trovi aliajn lingvojn, kiuj ebligu la scian komunikadon. Tion ni trovis en la angla, franca kaj germana lingvoj. Segerstedt konsciis, ke tio ne sufiĉas. Li donis ekzemplon, laŭ kiu kono de la rusa estus bezonata: en 1957 la mondo ne surpriziĝis pri la rusa sputniko, se la sciencistoj estus sekvintaj la ruslingvan scian literaturon. Esperanto laŭ Segerstedt estus, en la nuna stadio nur unu kroma lingvo apud aliaj uzataj en internaciaj rilatoj.

Profesoro Riesenfeld rilatigis esperanton al la fino de la 19a jarcento, kiam ĝi konstruiĝis, kaj al la tiamaj lingvokonaj. Ĝi baziĝas esence sur la okcidentaj lingvoj. La rusa, araba, ĉina kaj aliaj lingvoj havas alian lingvostukturon. Se esperanto estus konstruita hodiaŭ, ĝi certe aspektus alia, ĉar ni havas pli bonan konon pri funkcio de lingvo.

go lerni esperanton.

Gert Hornvall parolis pri la eksplodo de informado. Aperas ĉirkaŭ 80 000 diversaj sciencaj revuoj, kaj estas malfacile esti informita pri la enhavo de ili. Pri tio estas bezonata internacia kunlaboro. Oni jam havas kelkajn sistemojn pri stokigo de scienca informado en komputoroj, kiuj estas kontakteblaj internacie. Ankaŭ komputora tradukado jam survojas, sed malrapide.

Arne Gadd klarigis, ke ekzistas granda simpatio al esperanto en la movado, kiun li reprezentas en la parlamento (la laborista), sed li miris, kial la esperantistoj dediĉas tiel malmultan tempon al la kontaktoj kun la aliaj popolmovadoj. Li donis kelkajn ekzemplojn pri kazoj, kie oni provas solvi la lingvan problemon (UN kaj Nordlanda Konsilantaro), sed en kiuj en la vero ne sukcesis solvi ĝin.

Sekvis, post la enkondukaj prelegoj, diskuto inter la podianoj kaj kelkaj el la aŭskultantoj. Tiu diskuto temis ne pri la demando de internacia lingvo ĝenerale, sed pri esperanto, pri ĝiaj eblecoj, pri la kaŭzoj de ĝia malforteco. Arne Gadd donis respondon al rekta demando de iu, ĉu li pretus skribi proponon en la parlamento favora al esperanto: lia respondo estis nea, ĉar ne ekzistas publika opinio

Vi har just fått in

NYASTE NYA

i några exemplar:

LA GRANDA KALDRONO av John Francis. Stor originalroman om en skotsk familj under båda världskrigen. Pris med moms **132,—**

EL PROPRA KAJ FREMDA, små noveller och poesi av pastor Hans Amund Rosbach. Pris med moms **11,—**

LA TRIGROŜA ROMANO av Bertold Brecht, översättning av Karl Schulze. Roman, baserad på den kända «Tolvskillingsoperan». Pris med moms **109,—**

EN MASKOBALO av Julio Baghy. Fem små teaterstycken, en gång uppförda på kongressen i Nürnberg, nu i nyutgåva. Pris med moms **30,50**

GUDRUN, roman om en ung kvinna i Köpenhamn, av den kända danska författaren Joh. V. Jensen (Nobelpristagare 1944). Översättning av G. och H. Jensen. Pris med moms **26,—**

Alla priserna är något rabatterade

ESPERANTOFÖRLAGET
Fack, 200 42 Malmö, postgiro 578 - 5

Om faktura önskas tillkommer faktureringsavg 2,—




Kvin elstaraj upsalanoj diskutis la demandojn pri internacia komunikado kaj esperanto dum la kongreso de Uppsala.

Diversaj obstakloj troviĝas sur la vojo de esperanto: unu estas la naciaj politikoj de kelkaj ŝtatoj, alia la fakto, ke oni ne plu strebas al komunikado inter homoj, sed al komunikado inter spertuloj. Mankas vera motivi-

por esperanto en la lando. Ni devas unue krei tiun opinionon, kaj tio estas tasko por ni esperantistoj, ne por la politikistoj nek por la aliaj organizaĵoj.

Franko Luin



—TRADUKA KONKURSO—

Jen la rezulto de la unua traduka konkurso

Jam en la antaŭa numero de *La Espero* aperis noteto, ke la rezulto de la unua traduka konkurso, almenaŭ laŭ kvanto, estis kontentiga. La ĵurio, kiu kunsidis en Uppsala, povis konstati, ke ankaŭ la kvalito de la senditaj tradukaĵoj estis bona. Tio igis la laboron de la ĵurio iom pli malfacila. Sed ĝi opiniis, ke kelkaj tamen estis, pro iu aŭ alia kaŭzo, pli bonaj ol aliaj kaj decidis premii ilin.

En la branĉo poezio elstaris la traduko de Johan Hammond Rosbach de *Renesanco* de Gustaf Fröding. Vi povas legi ĝin sur tiu ĉi paĝo. Elekti la duan ne estis tiel facile, sed la ĵurio elektis la tradukon de Birger Viggen de *Nokturno* de Evert Taube. Ankaŭ ĝi troviĝas sur tiu ĉi paĝo. Ĝi estis elektita pro sia kanteblo, i a.

Pri du aliaj tradukaĵoj la ĵurio opiniis, ke ili meritas honoran mencion: eroj el *Vägmärken* de Dag Hammarskjöld en traduko de Bertil Nilsson kaj *Hejmen en aŭtuna pluvo* de Karl A. Tavaststjerna, tradukita de Thure Almroth. Vi povos kon-

atiĝi kun ili en alia numero de *La Espero*.

La nomo de Bertil Nilsson retroviĝas ankaŭ en la branĉo de letra prozo. La ĵurio decidis doni al li la unuan premion por lia traduko de la unua ĉapitro el *Röde Orm* de Frans G. Bengtsson. Temas, laŭ la ĵurio, pri sukcesa klopodo redoni en esperanto tekston, kiu jam en la sveda estas malfacila.

La dua premio estis aljuĝita al Harry Ivesjö pro lia traduko de novelo de Albert Viksten, *Sablokavo en arbardeklivo*.

Ankaŭ en tiu ĉi branĉo du kromaj tradukoj meritas specialan mencion: *Peco da pano kun Anna* de Herta Wirén, tradukita de Vivi Couppez, kaj la komencaj ĉapitroj de *Singoalla* de Viktor Rydberg, tradukita de Arvid Skoglund.

Ankaŭ al la branĉo faka prozo venis kontribuaĵo, sed de nur unu tradukinto. Pro tio la ĵurio ne havis eblecon elekti. Ĝi do decidis 'ŝpari' tiujn manuskriptojn ĝis la venonta jaro, esperante, ke pli da tradukontoj partoprenos tiun branĉon.

Nokturno

Dormu sen ĝen'!
Ruĝas via
vango en kaŝo de l'nokta silent'.
Dolĉe vi en
songo via
fuĝas de mi kiel ondo pro vent'.

Ree kaptata
ĝeme spiras.
Ne volas. Volas. Rebrulas la flam'.
Dormu amata.
Nokto iras.
Dormu. Vin gardas karese la am'.

Dormu ĉe mi,
karulino.
Luno sin levas el ombra pudor'.
Luna radi'
sur via sino
pentras la pason de la nokta hor'.

Regas en koro
sankta paco
meze en bruo de l'sangotorent'.
Ĉesis fervoro,
restas laco.
Dormu. Karesas printempa la vent'.

Evert Taube

Tradukis el la sveda Birger Viggen

Renesanco

«Belegaj ornamoj, je Pluto,
troviĝas sur via glaving';
vi estas artist', Benvenuto;
ĉu akras la ŝtala kling'?»

Pro l'krio de la amikaro
ekridis Cellini, ha-ha!
«Aperu, fiera Feraro!»
Cellini tiris ja.

«Rigardu la klingon el klingoj,
plej bonan en viv' kaj mit'.
Cellini el baraj ringoj
per ĝi eliros en spit'!

Se iu mokvortojn elbuŝos,
silentos li pro la ŝtal',
mi pikos per ĝi ĝis mi kuŝos
tutsola en morta fal'!

Ĝi estas protekt' de knabinoj
kaj de mia art' kaj teknik',
kun ĝi en la mano per vinoj
mi tostas al solamik'!»

Sed la servistino de vino
paliĝe en ampanik'
flustretas: «Malkaŝu, Cellin', ho,
la nomon de la amik'!»

«Almare la akvoj torentas,
fidelo kun sama em';
fidelon ĉiaman ja sentas
nur unu amik': mi mem!»

Kaj eningiginte la glavon,
kun brako ĉe ŝia tali',
li trinkis la glasan enhavon.
Kisetojn ricevis ŝi.

Gustaf Fröding

*Tradukis el la sveda
Johan Hammond Rosbach*

Esperantoförlaget planerar för framtiden

I samband med Esperantoförbundets årskongress i Uppsala höll Förlagsföreningen Esperanto årsstämma.

Bokslutet för 1977 visade en viss ökning av försäljningen, 34 800 kr mot 32 700 för år 1976. Resultatet efter inköp och omkostnader är dock sämre för 1977 (förlust 5 514 kr) än 1976, då förlusten var 526 kr. Sedan tillkommer ränteinkomster och en återföring av lagerreserv (på grund av att lagret minskat) så att nettoresultatet för 1977 ändå blir plus-minus 0.

Vid en bedömning av bokslutet måste man givetvis tänka på att Esperantoförlaget är ett serviceföretag för i första hand de

svenska esperantisterna, och det är inte meningen att rörelsen skall ge något större överskott. Men för att kunna säkra fortsatt service och nytugivningar måste ju även förlaget ha ett visst överskott på verksamheten; så 1977 års resultat är inte tillfredsställande. Vi har som andra företag drabbats av kostnadsstegringarna. Vi har en mycket stor förmedlingsverksamhet i förhållande till omsättningen (böcker och tidningar från utländska förlag) och kostnaderna stiger så snabbt att vi har svårt att hinna med i prissättningen. Dessutom tvekar vi att ta ut alltför höga priser av svenska esperantister.

— KURSER —

Du kan få bidrag för dina kurser

SEF kommer att anordna en veckoslutskurs för kursledare i esperanto i Jönköping i november.

Du vet väl, att om du får tillstånd en kurs för nybörjare eller en fortsättningskurs på din ort, så kan du få statsbidrag om du rapporterar kursen till något av de godkända studieförbunden (ABF, TBV, Vuxenskolan, FSF etc.). Bidraget utgår med 75% av cirkelkostnaderna (lärararvode och material). Du kan få ett lärararvode motsvarande vad som brukar betalas till lärare i andra kurser på respektive orter. Arvodet varierar efter lokala förhållanden och är skattepliktigt för dig.

Villkor: Minst 5 deltagare inklusive läraren vid varje sammanträde, minst 10 sammanträden, minst 20 studietimmar à 45 minuter. Minst 5 av deltagarna måste ha varit närvarande vid cirkelns 3 första sammanträden.

Studieförbunden ser gärna att våra kurser rapporteras. Den lokala studieorganisationen har ju i de flesta fall kommunalt stöd för studielokaler och allmän organisation, och de kommunala anslagen är numera baserade på antalet studietimmar. Dessutom är det för oss förmån-

ligt om vi kommer med i studieförbundens statistik.

Du som tänker delta i kursledarutbildningen i Jönköping bör tänka på att det finns vissa möjligheter att få bidrag till resor och kurskostnader. Du bör vända dig i första hand till din fackliga organisation, om du är ansluten till en sådan, i andra hand direkt till lokalavdelningen av ett godkänt studieförbund. Möjligheterna att få bidrag är givetvis störst om du redan leder en esperantokurs, men du kan få bidrag även om du planerar en kurs för nästa säsong.

Bidragen beslutas av lokalorganisationernas styrelser och kan i princip sökas när som helst under hösten, till och med efter det att kursen i Jönköping har ägt rum. På en del orter vill man dock gärna ha med sådana anslag i sin budget för nästa verksamhetsår, och efter som studieförbunden brukar ha verksamhetsåret 1 juli — 30 juni, så vill man där gärna ha din ansökan före halvårsskiftet.

Möjligheterna att få bidrag varierar från ort till ort och det har naturligtvis betydelse vilken kontakt du har med beslutsfattarna. Men gör gärna ett försök.

Åke Blomberg

En del hoppingivande informationer kunde dock lämnas i Uppsala. För det första har arbetet med sättningen av den nya svensk-esperantiska ordboken från och med i år äntligen kommit igång på allvar. Det har visat sig vara ett mycket mera komplicerat och tidskrävande arbete än vi från början föreställde oss. Vi satsar nu allt på att få själva sättningen avslutad under året, så att ordboken kan komma ut senast i början av 1979.

Ett par andra utgivningar planeras också under året: Harry Martinssons *Aniara* och en lät-

tare läsebok för fortsättningskurser, den senare en översättning från tyska. I båda fallen har vi preliminära utgivningstillstånd.

Årsstämman var ovanligt välbesökt och intresset för verksamheten glädjande stort. Många goda idéer framfördes under diskussionen, idéer som styrelsen har att undersöka och vidareutveckla.

Verksamhetsberättelse med bokslut kan erhållas från Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö, mot portokostnad 2,50.

Åke Blomberg

— LA ESPERO 1913 —

SEFs årsmöte 1913: enighet och samförstånd

Detta nummer av *La Espero* handlar till en stor del om Esperantoförbundets årsmöte. Vad var det för frågor som behandlades på ett årsmöte 1913? Julinumret av *La Espero* från 1913 ger oss besked om det.

«Med anledning av ett förslag av ordf., gående ut på att söka erhålla statsunderstöd för den esperantiska turistverksamheten i Sverige, beslöts tillsätta en kommitté för ändamålet, vilken i första hand skulle utreda

O. Roesel, Borås, talade för förslaget i det han påvisade huru man i utlandet med gott resultat använde detta sätt. Mötet beslöt att i enlighet med förslaget tillsätta en kommitté.

Hr J. Lindblom föreslog, att till de, som genomgått kurs i Esperanto och förvärvat sig en högre grad av insikt och kunskap i språket skulle såsom premie utdelas något lämpligt utmärkelsetecken, t. ex. en i guldring infattad Esperantostjärna,



och om möjligt upprätta en statistik över i vilken grad dylika understöd för utgivande av turistbroschyrer o. d. eller på annat sätt lämnats av utländska stater och kommuner. Till kommitterade utsågos hrr Teod. Rosengren och John Johansson, Stockholm, vilka hade att själva utse en tredje medlem.

Från kassör J. Helsing, Gefle, förelåg ett förslag om anordnande av en föredrags- och propagandaresa, men beslöt mötet att för vidare utredning remittera detsamma till styrelsen.

Måndagen den 7 juli återupptogs förhandlingarna, varvid hr Helsing framlade ett förslag att tillsätta en presskommitté med uppgift att till dagspressen lämna tillförlitliga uppgifter ang. Esperantorörelsen. Disp.

för att därigenom sporra lärlingen. Förslaget, som vann allmänt gillande, hänsköts till styrelsen».

1913 hölls årsmötet i Gävle (eller Gefle som man stavade på den tiden) och hela VU som valdes det året bestod av Gävlebor. Till ordförande valdes dock enhälligt trafikchefsassistent John Lundgren, Hedemora.

«Det av enighet och samförstånd präglade mötet avslöts härefter med ett anförande av hr Roesel, vari han dels uttryckte förbundets tack till anordnarna av årets Esperantodag, och dels manade till fortsatt energisk och målmedvetet arbete för Esperanto i Sverige. Efter mötet vidtog på kvällen en lyckad avslutningsfest på Strömdalen».

Kurso pri interpretado: malgranda, sed sukcesa

Preparu vin bone!

La unua regulo por interpretado estas: preparu vin bone!

Tion lernis grupo de 8 partoprenantoj dum semajnfina kurso pri interpretado, kiu okazis en Stokholmo la 20an kaj 21an de majo.

Okazas ofte, ke esperantistoj devas helpi traduki, kiam venas gasto el eksterlando. Pastro Ciccanti, Elsbeth Bormann, Justin Minani estas kelkaj el la lastatempaj gastoj. Ili faris vizitojn al lernejoj aŭ aliaj organizaĵoj, kaj ĵurnalistoj intervjuis ilin. Ĉiam necesis traduki — aŭ, pli ĝuste, interpreti.

La plej lertaj esperantistoj ne ĉiam havas eblecon interpreti: ili laboras, aŭ ne povas kuniri pro alia kaŭzo. Do, tiuj kiuj fakte faras la interpretadon estas amatoroj.

Por amatoroj validas la regulo eĉ pli ol por profesiaj interpretistoj: preparu vin! Se oni scias, pri kio temos la prelego, kaj eble eĉ kontrolis la plej oftajn aŭ plej malfacilajn vortojn en vortaro, estas multe pli bona rezulto.

Improvizita kurso

La kurso pri interpretado estis iom improvizita, ĉar la anocita kursgvidanto Lennart Åberg malsaniĝis. Unu partoprenanto, Guy Coste, studas interpretadon de la franca ĉe la universitato de Uppsala kaj kontribuis multe al la kurso.

Kiel ekzercon li rakontis inter alie historion, de kiu la unua peco estis proksimume jena:

«Hodiaŭ matene mi leviĝis frue, ĉar mi volis esti je bona tempo en la kurso. Sed mi volis ankaŭ tajpi tekston de flugfolio, kiu temos pri esperanto kaj kiun ni intencas disdoni dum demonstracio de la mediogrupoj la 3-an de junio; ĝi iros de Humlegården en Stokholm. Mi ne predevis pretigi ĝin en la mateno, ĉar se ni disdonas ĝin sen montri ĝin al la estraranoj, ili batos mian kapon. Tial mi estis jam iom malfrua, kiam mi ekiris al la aŭtobuso. Mi intencis iri per numero 18.»

En tiu rakonto estas amaso da detaloj, kiel kutime estas, kiam oni parolas iom libere. Kiuj detaloj estas gravaj? Kiel oni povas memori ĉiujn detalojn kiam oni interpretas?

Papero kaj krajono

Ciferoj, nomoj kaj malfacilaj vortoj estas tre gravaj detaloj.

Por memori ilin necesas papero kaj krajono.

Ĉar temas pri «sinsekva» tradukado, eblas ankaŭ peti pliajn informojn de la parolanto: Kion vi celas per tiu vorto? Kiu cifero estas?

La interpretanto povas ankaŭ peti la parolanton pri paŭzo por la traduko. (Tio ja ne eblas je «samtempa» tradukado, sed samtempan tradukadon ni kompreneble ne ekzercis).

Kiel prepari sin?

Baza preparo estas serĉi tekstojn pri la temo, kaj legi pri ĝi tiel ke oni komprenas ĝin. Kelkaj el la partoprenintoj ĉeestis la konferencon de la Freinet-movado en Årjäng en julio. Ili devus, por povi interpreti en ĝi, konatiĝi iom kun la sveda lerneja sistemo, por pli facile kompreni la enhavon, kiam instruisto klarigos ĝin al la eksterlandanoj. Krome, la instruistoj de la Freinet-movado interesigas pri sociaj problemoj, kaj do estus bone legi iom el tio, kion la svedaj aŭtoritatoj eldonis pri emigrantoj kaj la labormedio.

Por pli grandaj konferencoj, kiel la kongreso en Stokholmo 1980, estas bone ke kelkaj esperantistoj iom specialiĝu pri, ekzemple, medicino (se iu malsaniĝos), pri turismaj aferoj, pri socio kaj lernejoj. Por tiu kongreso necesas ankaŭ memori, ke



Por interpreti la plej utilaj iloj estas krajono kaj peco da papero. Bona memoro ankaŭ utilas.

la interpretistoj ne povas fari aliajn taskojn samtempe: ne eblas samtempe aranĝi praktikajn demandojn kun la aŭtobusŝoforo kaj traduki tion, kion diras iu alia.

Kompreneble, la plej simpla maniero prepari sin estas demandi la prelegonton, pri kio temos la prelego.

Vortlistoj pri la plej malfacilaj vortoj estas ankaŭ bona helpo. Kiu scias subite traduki «landsting» en esperanton?

Ekzerci: tio estas simpla

Guy donis kelkajn proponojn pri facilaj ekzercoj. Kiu ajn povas fari ilin, ĉu sola ĉu en grupo.

1. Legu tekston en la sveda. Poste resumu ĝin, aŭ rerakontu ĝin, ĉiam en la sveda. Tio estas bona ekzerco pri tri aferoj: a) vi ekzercas memori; b) vi ekzercas analizi, do kompreni, kion la skribinto volis diri; c) vi ekzercas teknikon fari notojn.

2. Simile kiel la antaŭa ekzerco, sed faru la resumon aŭ rerakonton en esperanto.

3. Traduku rekte tekston el la gazeto. Aŭ el radio aŭ televido!

4. Faru notojn dum prelego, kaj poste traduku laŭ la notoj.

5. Jen ekzerco por grupo de tri personoj: dialogo pri iu temo. Unu parolas svede, la dua nur en esperanto, la tria nur interpretas.

Pliaj kursoj bezonataj

La semajnfina kurso dum majo estis eksperimento. Ĝi funkciis bone kaj ĝi donis la bazajn konojn.

Kiel oni povas aranĝi pli da ekzercado? Kiel ni povas doni al pli da esperantistoj la eblecon ekzerci interpretadon?

Ulla Luin

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

Några främmande ansikten, några främmande ord, några främmande dofter: mer behövs inte för att riva av 'civilisationens ansiktsmask'.

Det vet alla invandrare, även i Sverige, tyvärr.

Man frågar sig hur ett av världens rikaste och, vad det gäller utbildning, bäst rustade länder än i dag kan drabbas av en så grov etnocentrism och uttrycka en sådan rädsla inför det okända. Visar detta en i grunden bristande tro på den egna kulturen?

Många delförklaringar diskuteras, så som senast onsdagen den 10 maj i *Öppen kanal* i Sveriges Radio, och onekligen är det många faktorer som spelar in. Man talar om den urbaniserade människans otrygghet och 'kulturlöshet', slapphet och normlöshet i barnuppfostran, skolans misslyckande, den ekonomiska krisens inverkan och den hårdnande konkurrensen om arbetstillfällen osv.

Men en faktor som, såvitt jag minns, inte någon tog upp i det programmet och, vad jag vet, inte tidigare heller, är den stora dissonans som föreligger mellan å ena sidan den språk- och kulturpolitik som landet för och å andra sidan den invandrings- och utrikespolitik som antsetts nödvändig efter kriget.

Man undervisar nämligen i engelska, franska och tyska i grundskolan och ges därmed inblick i kulturer i några av de länder där dessa språk är, officiellt, modersmål — medan de stora invandrargrupperna kommer från Finland, Grekland, Jugoslavien, Turkiet och andra länder, där i regel både språk och kultur är radikalt annorlunda. Man undervisar också i spanska, ryska och andra språk på gymnasiet och universitetet, men dessa språk läses av få svenskar. Inom den frivilliga undervisningen har, på grund av den ekonomiska prioriteringen av engelskan, ensidigheten blivit kanske ännu mera påfallande. Jag räknar då med antalet studiecirkel och studietimmar i varje språk.

Man undervisar i praktiken nästan uteslutande i indoeuropeiska språk och då mest i engelska. Resultatet kan lätt beskrivas med några ord: «Det som inte finns på engelska, det finns inte». Detta gäller även för universitetet där den vetenskapliga allsidigheten följaktli-

Språkfrågan är värd större uppmärksamhet

gen hotas.

Denna begränsning till den västerländska kulturen består, alltmedan Sverige genom invandring, handel, biståndspolitik, turism osv har en allt större kontakt med länder som inte har indoeuropeiska, eller i varje fall inte anglosaxiska, modersmål. Med andra ord: medan Sverige får huvuddelen av sina tekniska och kulturella impulser från några få länder och kulturområden, brakar en helt annan verklighet in i Svenssons vardagsliv: på arbetsplatsen, i snabbköpet, i förorten, i skolan...

fraser. Inte heller räcker det med tv-kampanjer. Man behöver, så tidigt som möjligt, nära personliga kontakter med främningar och deras kultur.

Att turismen inte uppfyller sådana krav borde vara klart för alla. Mycket bättre resultat ger utbytes- och stipendieverksamhet, kontaktnät som Servas, vänskapsföreningar, internationella arbetsläger, resande folkhögskolor mm. Men med dessa när man mest vuxna och tonåringar i sociala minoritetsgrupper, medan **alla** behöver lära sig att visa tolerans redan vid ett

”Det finns en stor dissonans mellan den språk- och kulturpolitik som Sverige för och landets invandrings- och utrikespolitik.”

BIALYSTOK-GÖTEBORG: HAR VERKLIGEN ETT SEKEL FÖRFLUTIT (ELLER VAD SYSSLAR SOCIOLOGER OCH PEDAGOGER EGENT- LIGEN MED)?

Skall man nu förvåna sig över att en invandringspolitik, som man varken har brytt sig om att planera ordentligt eller lagt någon större möda vid att förklara för gemene man, saknar den nödvändiga enhetliga förankringen i alla samhällsskikt, förankringen som krävs om man skall undvika gettobildningar och pogromer?

Etnocentrismen kan väl faktiskt tjäna som något av en räddningsplanka när den traditionella kulturen slagits i spillo i industrialismens och urbaniseringens spår, och när amerikaniseringen utgör ett allt tydligare hot mot alla som — trots alla bedrägliga löften — faktiskt har misslyckats med att behålla engelska i tal och skrift.

Denna etnocentrism, ofta förstärkt av sociocentrism, kan inte överbryggas med vackra

mycket tidigt stadium av sitt liv.

Från officiellt svenskt håll började man med att tillsätta olika utredningar först när situationen blivit krisartad. Och fortfarande gör man, vad jag vet, mycket lite för att lära sig att umgås spontant, redan på ett tidigt stadium. Hela ansvaret vältras över på invandrarna och alla ansträngningar, i praktiken, på **deras** anpassning.

Det är inte att undra på att ett och annat nazistiskt flygblad dyker upp på skolgårdar och att samhällets mest kontaktlösa grupper ställer till med några upplagefrämjande sammandrabbningar, precis som i Bialystok för hundra år sedan.

EN KEDJA ÄR ALDRIG STARKARE ÄN SIN SVAGASTE LÄNK

Den faktor som jag här behandlat kan förefalla mindre betydelsefull i denna problematik. Men även om andra faktorer kan betraktas som 'tyngre', så är det språket som är kommunikationsmedlet och bärare av gängse värderingar. Det vore

kanske mödan värt att ägna det något större uppmärksamhet.

Dessa tankegångar är inte nya. De var, bland annat, inspirationskälla för gettografen Lazarus Ludvig Zamenhof, skaparen av det internationella språket esperanto. I Bialystok (nuvarande Polen), där språket bara var den mest synliga delen av den sociala skiktningen, var kanske gymnasisten Ludvigs drömmar om etnisk fred naiva. Men i dag borde situationen vara annorlunda, i och med ståndssamhällets upplösning, kommunikationernas utveckling och de därmed krympande avstånden, och genom de omfattande tvångsförflyttningarna kors och tvärs över jordklotet.

I Bialystok talade man fem språk. I dagens Sverige kan man räkna med minst ett tjugotal betydande etniska grupper (till Uppsala kommer invandrare och gäststuderande från hela 90 länder!). Det är naturligtvis omöjligt att systematiskt undervisa i tiotals språk på varje grundskola, vilket vore ett nyckelvillkor för en aktiv pedagogik i samhällskunskapsundervisningen. Här syftar jag på en önskad direktkontakt mellan syskonklasser i främmande länder, t ex genom korrespondens i text och på band, utbyte av klasstidningar, miljö- och hembygdstudier, utbytesresor osv.

Men en sådan 'aktiv pedagogik' är inte omöjlig. Den skulle kunna uppnås genom att införa ett gemensamt 'allas första främmande språk' som, till skillnad från engelska, franska eller ryska, enhälligt kunde accepteras av de olika länderna som politiskt och kulturellt neutralt och — vilket är ännu viktigare — som snabbt kunde läras så att det gick att använda praktiskt redan på mellanstadiet i skolan. På sikt kunde detta språk utgöra en viktig länk i kampen mot den hotande uppblomstringen av nazistiska stämningar, såväl i Sverige som på andra håll. Att jag här syftar på esperanto behöver kanske inte påpekas särskilt.

Naturligtvis utgör inte införandet av det jämförelsevis lättlärdaste esperanto på sikt lösningen på problemet med raskravaller, främlings- och avvikarhat och trakasserier. Men det vore kanske dags att undersöka, seriöst, fördomsfritt och framsynt, vad en sådan åtgärd kunde göra för den mellanfolkliga freden här i Sverige och i andra länder; inte som en isolerad kraft, utan som ett led i en global politik.

Guy Coste